



BULTENO

de Esperantista Klubo en Praha
Věstník Klubu esperantistů v Praze
pošt. schr. 1069 111 21 Praha 1

N-ro 3/2000

julio/červenec 2000

Edmond Privat

En Parizo kaj en Prago 1915

Reveninte en Parizon en la jaro 1915 mi fariĝis kunlaboranto de la granda serioza ĵurnalo „Le Temps” kaj, ĉar mi estas sviso kaj ankaŭ skribis tiam en „Journal de Genève” mi do rajtis vojaĝi kun svisa pasporto en Aŭstrio kaj Hungario. La redakcioj petis min veturi tien kaj studi la naciajn movadojn de la ĉeĥoj, slovakoj kaj slovenoj por verki serion da artikoloj pri la sentoj kaj esperoj de tiuj popoloj. Oni ekparolis tiam pri la iama principo de la rajtoj de la popoloj disponi pri si mem, kaj la publiko deziris legi pri tiuj slavaj nacioj, kies teritorioj apartenis ankoraŭ al la malnova aŭstrohungara imperio.

Estis iom dangera vojaĝo en tempo de mondmilito, sed treege interesa, kaj mi lernis parkere la adresojn de pluraj esperantistaj korespondantoj en tiuj landoj por ilin viziti kaj diri al ili la celon de mia informvojaĝo. Travojaĝinte Vienon sen halto tie, mi unue veturis al Prago kaj devis multe kuri gis mi povis trovi samideanojn,

Edmond Privat (1889-1962), Ŝvýcar, významný pracovník světového esperantského hnutí. Zpočátku novinář, později pracovník ve Společnosti národů v Ženevě, posléze profesor angličtiny na univerzitě v Ženevě. Autor řady odborných publikací. Celý život pracoval pro obnovení polského státu (před r. 1918), pro osvobození Indie od britské nadvlády a pro všeobecné zavedení esperanta.

Edmond Privat

V Paříži a v Praze 1915

Když jsem se vrátil do Paříže v r. 1915, stal jsem se spolupracovníkem velkých vážných novin „Le Temps“ a protože jsem Švýcar a také jsem psal tehdy do „Journal de Genève“, směl jsem cestovat se švýcarským pasem v Rakousku a Uhersku. Redakce mě žádaly, abych tam jel a studoval národní hnutí Čechů, Slováků a Slovinců a abych napsal sérii článků o pocitech a nadějích těchto národů. Začalo se tehdy mluvit o slavné zásadě práv národů rozhodovat o sobě samých, a veřejnost si přála číst o těchto slovanských národech, jejichž území náležela doposud staré rakouskouherské říši.

Bylo poněkud nebezpečné cestovat v době světové války, ale velice zajímavé, a já jsem se naučil nazpaměť adresy několika esperantistů

ĉar multaj el ili deĵoris en armeo. Fine mi sukcesis kaj pasigis neforgeseblan vesperon en kela subtera renkontejo, kie miaj amikoj povis detale sciigi min pri la naciaj esperoj de la ĉeĥa popolo. Ili jam ne dubis, ke la okcidentaj potencoj fine venkos la militon kaj ili deziris, ke la franca kaj angla publiko aŭdu pri la deziroj de ĉeĥoj.

Antaŭ ol forlasi Parizon mi estis farinta aranĝon kun DailyNews en Londono por ankaŭ presigi artikolojn tie. Certe la policoj de tiu tempo ankoraŭ ne fariĝis tiel zorge organizitaj kaj severaj kiel dum la dua mondmilito, ĉar alie mi ne estus volinta kaŭzi riskojn al miaj ĝentilaj kunparolantoj, sed ili estis ankaŭ kuraĝaj kaj preferis ion riski por ke la voĉo de la ĉeĥa popolo aŭdiĝu en Okcidento. Sed ili rakontis al mi, ke pluraj personoj estis arestitaj pro malprudentaj paroloj aŭ gestoj. Ĝus unu estis kondamnita al 10 monatoj, ĉar li ne leviĝis ĉe la himno. Kiam mi revenis Parizon kaj publikigis artikolojn pri mia vizito al Prago, mi baldaŭ ricevis dankleteron de ĉeĥa profesoro, la filozofo Tomaso Masaryk, kiu poste fariĝis prezidento de Ĉeĥoslovaka Respubliko. Li sendis al mi sian sekretarion Eduardo Beneš, ankaŭ rifuĝinton kiel li mem, kaj mi invitis al modesta tagmanĝo en mia hejmo pariza tiun junan patrioton ĉeĥan, kiu poste fariĝis eksterlanda ministro kaj fine prezidento. Ni fariĝis

dopisujících si v těchto zemích, abych je mohl navštívit a říci jim účel své informační cesty. Projel jsem Vídní bez zastávky a nejprve jsem jel do Prahy a musel jsem hodně běhat, než jsem mohl najít esperantisty, protože mnozí z nich sloužili v armádě. Nakonec jsem uspěl a strávil jsem nezapomenutelný večer ve sklepní podzemní místnosti, kde mne mí přátelé mohli podrobně informovat o národních nadějích českého národa. Už nepochybovali, že západní mocnosti nakonec vyhrájí válku a přáli si, aby francouzská a anglická veřejnost slyšely o českých přáních.

Než jsem opustil Paříž, dohodl jsem se s „Daily News“ v Londýně, že budu tisknout články také u nich. Jistě policie v tehdejší době ještě nebyly tak pečlivě organizované a přísné jako v druhé světové válce, protože jinak bych byl nechtěl působit riziko svým pozorným spolubesedníkům, avšak oni byli také odvážní a raději něco riskovali, aby hlas českého národa byl slyšet na Západě. Avšak vyprávěli mi, že více osob bylo zatčeno za neuvážené řeči či gesta. Právě jeden byl odsouzen na 10 měsíců, protože nepovstal při hymně.

Když jsem se vrátil do Paříže a uveřejnil články o své návštěvě Prahy, brzy jsem dostal děkovní dopis od českého profesora, filozofa Tomáše Masaryka, který se později stal prezidentem Československé republiky. Poslal mi svého tajemníka Edvarda Beneše, také uprchlíka jako on sám, pozval jsem na skromný oběd ve svém pařížském domově tohoto mladého českého vlastence, který se později stal zahraničním ministrem a nakonec prezidentem. Stali jsme se dobrými přáteli a vždycky pomáhal našemu hnutí ve Společnosti národů a také ve své vlastní zemi.

bonaj amikoj kaj li ĉiam helpis al nia movado ĉe la Ligo de Nacioj kaj ankaŭ en sia propra lando.

Mi ne forgesu diri kiom plaĉis al mi la beleco de Prago. Pli poste mi diversfoje revizitis tiun belan urbon kaj ĉiam pli admiris ĝin kaj amis ties loĝantojn.

(El „Aventuroj de Pioniro“)

La homkomercisto de Amsterdamo

Jaroslav Hašek

Post kiam mi povis neniel utili al la ĉeĥa nacio, mi ekintencis liveradi instruojn al ĝi. Por tiu celo mi gajnis eminentan homon, kiu jam trifoje estis arestita en la Pankrác-arestejo pro diversaj raboj kaj havis tiom bonegan fantazion, ke ĝi estis admirinda.

Krome li regis la plumon tiom adekvate, ke li povis siajn pensojn prezenti en konvena formo, sen ke tio lacigus mian pluan kunlaboranton, al kiu male mankis originalaj pensoj, sed kiu la prezentitajn temojn kaj skizitajn aferojn scipovis prilabori tre vigle, lerte kaj atentokapte.

Diskutinte iom kun ili mi sciigis al ambaŭ miaj estimataj kunlaborantoj, ke mia intenco estas fondi eldonistan firmaon, kiu liverus al la ĉeĥa publiko allogan legaĵon.

Mi do ellaboris kun ambaŭ kontrakton, en kiu ili devontigis sin, ke por la kutima honorario por unu folio ili transdonos al mi atentovekan romanon antaŭ fino de kvin monatoj.

Post kvin monatoj en mia eldonejo estis aperigita la unua kajero de verko "La homkomercisto de Amsterdamo" aŭ "La mistera murdo en Nigra Kaverno" alie "Taverno Ĉe Sanga Episkopo". La romano aperadis dum kvar jaroj en semajnkajeroj po 80 heleroj, sekve de kio aperis entute 208 kajeroj en suma pezo de 18 kilogramoj. Kian ŝaton ĝi ĝuis, tion plej bone pruvas la kazo de nutraĵ-vendistino Vozábová, kion mi ĉi tie prezentas.

*

František Holan, taglaboristo, havis dek du infanojn kaj ĝuste li estis atendanta la dektrian, kiam kolportisto alportis al li la unuan kajeron

Nesmím zapomenout říci, jak se mi líbila krásá Prahy. Později jsem mnohokrát navštívil toto krásné město a stále více jsem je obdivoval a miloval jeho obyvatele.

(Z „Dobrodružství průkopníka“ přeložil jpa)

de "La homkomercisto de Amsterdamo", aŭ "La mistera murdo en Nigra Kaverno" alie "Taverno Ĉe Sanga Episkopo". Atendante kun streĉo la novan pliigon en la familion, Holan enuis, tial por mallongigi la enuon li komencis legi tiun ĉi unuan kajeron. Li legis kun ĉiam pli kaj pli granda intereso. Ĝi komenciĝis tre belege: "En Amsterdamo ĉe la haveno en flanka strateto, kie malaperas en la akvo de kanalo senspure centoj da fremduloj ĉiujare, estas malgranda gastejo kaj en ĝi eblas ricevi gastĉambrojn. Kompreneble, en la trinkaĵon de gastoj, kiuj volas ĉi tie tranokti, oni almiksas dormigan pilolon kaj poste... poste la lito kun la gasto malaperas en enfalejo kaj en kelo. Bato, terura, obtuza ekkrio... Apud la gastejo estas viandovendejo. Tie oni hakas kaj vendas tiom malmultekostan viandon, ke en la vendejo troviĝas ĉiam multe da aĉetantoj. La viando havas specialan kromguston - ili ja tie hakas homan karnon! Ĉu vi komprenas, kiel oni tion faras? En la kelo oni buĉas la endormigitajn tranoktintojn per hakilo-bato, senviscerigas ilin, dishakas kaj transigas dumnokte la homan karnon en la viando-vendejon. Sed Roberto Klega eskapis de tie per maniero supernatura..." Tio estis lasta frazo en la kajero. Ekde tiu tempo tag-laboristo Holan aĉetadis "La homkomercisto de Amsterdamo". Okdek heleroj semajne faris al li grandajn malfacilaĵojn ĉe dek tri infanoj. Pro tio li sendadis siajn plej junajn infanojn alterne ĉiusabate almozpeti kaj por la elpetita sumo li aĉetadis plu "La homkomercisto de Amsterdamo" kaj plezurĝuis la detalan priskribon de tiuj murdoj, kiuj estis tiom inĝenie aranĝitaj, ke ĉiu kajero finiĝis per la komenco

de mortigado kaj la viktimon ili batmortigis kaj frapbuĉis nur en la komenco de la plua kajero, en kiu ĉe la fino ili kaptis la rabistarestro, kiu en la antaŭlasta frazo jam ankaŭ malsupreniĝis el prizono sur fulmokonduktilo kaj saltis trans muron, kiam subite, trafita per kuglo de gardisto li sinkis, por rekolekti la fortojn por fuĝi en la komenco de nova kajero, kaj en boato dum fulmotondro, kiam la remilojn vento elŝiris el lia mano, li renkontiĝis kun hordo da kontrabandistoj en la lasta frazo de kajero, kie li rekonas en la ĉefo la eksan amatinon, delogitan de grafo de Galois. Kaj tiel ĝi daŭris.

La historio de taverno "Ĉe Sanga Episkopo" estis priskribata pli ol duonjaron, kiam en la kajeroj armeo kaj ĝendarmaro vane esplorsercis la ombron de "Sanga Episkopo".

Kvar jaroj tiel pasis en la fervora legado de "La homkomercisto de Amsterdamo", la taglaboristo Holan traploris la tutajn punktojn super la sorto de la fuĝinta princino de Galois, la duonfratino de ĉefo de kontrabandistoj, tiu alivestita delogita amatino de la rabistarestro, kies nigran kavernon ĵus ĉirkaŭis armeo, kaj kiu en akvofalo fornaĝis de la danĝero.

Kiam li finlegis la lastan kajeron 208an, elspezinte por "La homkomercisto de Amsterdamo" sume 166 kronojn 40 helerojn, li traploris unu tutan punkton, kaj rememorinte la tristan finon de la rabistarestro, kiun oni en la lasta kajero pendumis, krevis lia koro pro kompato kaj li forlasis la vidvinon kun dek tri infanoj tute sen rimedoj. La vidvino post la sepulto vendis ĉiujn 208 kajerojn al la kontraŭflanka nutraĵvendistino Vozábová, por 1 krono 40 heleroj, tio estas 18 kilogramoj da papero por kolbasetoj kaj simile po 8 heleroj por 1 kilogramo.

Sinjinoro Vozábová estis afabla virino, kiu havis du specojn de klientoj: unuj aĉetis kontante, kaj la aliaj kredite. Al ĉiuj ŝi kondukis afable, sole al sinjinoroj, kiuj aĉetis kontante, ŝi diris "Moŝta sinjinoro" kaj "Mankison", dum al la dua klaso simple nur "Ĉu vi deziras, sinjinoro?" kaj "Mian respekton!". Aliaj diferencoj ne estis.

Tiu ĉi honesta sinjinoro, aĉetinta de vidvino Holan 208 kajerojn de "La homkomercisto de Amsterdamo", igis forporti la paperon en la loĝejon, kaj ferminte la butikon, ŝi ekdecidis tranĉi el la kajeroj foliojn por paperkornetoj.

Ŝi do prenis la unuan kajeron kaj intencis eklabori, kiam ŝia rigardo falis sur dikajn literojn: "Ha, ili vendas en viandovendejo la karnon el buĉitaj homoj!" Ŝi levis la ŝultrojn, demetis la tranĉilon kaj komencis informiĝi pri la nekutima branĉo de viandovendado. Ekde tiu tempo ŝi serioziĝis. La duan tagon ŝi tralegis la duan kajeron, la trian kaj la kvaran, meznombro tri ĉiutage, kaj tiel pasis naŭdek tagoj, ol ŝi tralegis ĉiujn 208 kajerojn. Ekde la kajero 108a ĝis la 208a ŝi ĉesis zorgi pri sia ekstera aspekto kaj ne ŝanĝis siajn vestojn.

La naŭdekan tagon ŝiaj plej bonaj klientinoj, kiuj aĉetis kontante, ricevis de ŝi poŝtkarton kun jena enhavo: "Moŝta sinjinoro, bonvolu ĉi-vespere veni en mian loĝejon, mi havas por vi grandan novaĵon!"

Kiam ili venis, ŝi batmortigis ĉiujn per hakilo. Tuj kiam la informo pri tio disvastiĝis tra la urbo, mi devis presigi novan eldonon de "La homkomercisto de Amsterdamo".

Tradukis Jiří Patera

La agado de la Esperantista Klubo en Praha en la j. 1999
pritraktita en la jarkunveno la 24an de marto 2000.

Zpráva o činnosti Klubu esperantistů v Praze v roce 1999, projednaná na výroční členské chůzi dne 24. 3. 2000.

La kunvenoj de la klubo okazis ĝis la fino de junio en la Domo de infanoj kaj junularo en Opatov kaj ankaŭ en la kunvenejo de handikapuloj en Rybná str. Ekde septembro la kunvenoj okazis komune en la Socia centro de la Loks oficejo de Praha 1 en Rybná str. n-ro 27, kaj nome ĉiuvendrede posttagmeze por pensiuloj kaj vespere por laborantaj membroj. Sed montriĝis, ke vendredoj ne konvenas por niaj membroj kaj ni strebos akiri alian tagon por niaj kunvenoj.

La programo de la kunvenoj estas precipe konversacia, prelegoj estis nur kelkaj, ekz. de d-ro Dvořáková pri ŝia vojaĝo al Israelo, aŭ de s-anino Urbanová pri ŝia poezio kaj pri la libro Hetajro dancas.

La partopreno en la kunvenoj estis malalta, kutime ĉirkaŭ 12 personoj, nur kelkfoje vizitis nin eksterlandaj esperantistoj (plejparte rusaj samideanoj).

Dum pli ol dek jaroj ni ne havis kursojn por komencantoj, sekve estis preparita nova kurso, estis pendigitaj grandaj afiŝoj, en la metrostacio I. P. Pavlova estis disdonitaj flugfolioj. La rezulto: aliĝis du interesuloj.

Nia informado pri Esperanto stagnis, tamen la 18an de novembro 1999 la klub-prezidanto prelegis pri Esperanto antaŭ 120 malgrandaj infanoj en la Baza lernejo en Rakovského strato en Modřany.

La klubo Bulteno en la j. 1999 ne aperis, sed dufoje estis dissenditaj leteroj al la membroj pri la loko kaj tempo de kunvenoj.

La komitato de la klubo ne kunvenis regule, la decidoj okazis laŭ konkretaj problemoj.

Iuj membroj de la klubo plenumis gravajn funkciojn en la movado: la komitatano P. Chrdle estas vicprez. de ĈEA kaj estrarano de UEA, S. Chrdlová estis ĉefdelegito de UEA, J. Ondráček estas komitatano de ĈEA, Z. Pluhař estas estro de Libroservo de ĈEA, M. Křenková prilaboras la kronikon de nia klubo, H. Maudrová kun M. Šmidrkalová prizorgas la kunvenojn de la klubo, krom Ĥ. Maudrová dissendas bondezirajn al jubileantaj klubanoj. Multaj niaj membroj aktive laboras en la Asocio de esperantistoj handikapuloj. Kvar klubanoj partoprenis la UK en Berlino, tri partoprenis (kaj du el ili prizorgis) la SAT-kongreson en Karlovy Vary kaj ankaŭ la ILEI-konferencon samloke.

Laŭ la raporto de la kasisto la financoj de la klubo fine de la jaro superis la sumon de 24 mil kronoj. Elspezoj iom superis enspezojn, precipe pro la kurs-afiŝoj, depagoj por ŝparbanko, poŝt- kaj aliaj elspezoj, kotizoj por ICN k. a.

La jarkunveno decidis agnoski la ĝisnunan komitaton, sed sen la demisiinta K. Krajičková. Sekve la komitato de la klubo estas jena: prezidanto: Jiří Patera, kasisto: Jindřich Ondráček, propagandisto: Bohumil Bouzek, kursgvidanto: Jaroslava Blažková, komitatano: Petr Chrdle, revizoro: Helena Maudrová.

La jarkunvenon ĉeestis la ĉeĥa poetino Zdenka Bergrová kaj ŝia edzo, la vidartisto Věroslav Bergr, ĉar ili interesiĝas pri Esperanto. S-ino Bergrová aperigis informon pri nia jarkunveno en ĵurnalo Zemské noviny la 8an de aprilo 2000. -jpa-

85. světový kongres esperantistů

se bude konat v Tel-Avivu od 25. července do 1. srpna 2000. Hlavní téma, které bude kongres projednávat, „Jazyk a kultura míru“, je v souladu s usnesením OSN a UNESCO, které vyhlásily rok 2000 „Rokem pro kulturu míru“.

V rámci kongresu budou uspořádány celodenní výlety do Jerusaléma, k Mrtvému moři a do různých míst v okolí Tel-Avivu. Rovněž před kongresem a po něm budou uspořádány různé turistické akce, jako šestidenní okružní cesta Israelem, sever Israele ve dvou dnech, nebo čtyřdenní cesta Jordánském a Israelem.

Ve dnech 22.-25. července proběhne předkongres v Ammánu v Jordánsku, nad kterým převzal záštitu jordánský ministr kultury prof. Faisal O. Al-Refon'h. Součástí předkongresu bude seminář v Královském paláci kultury na téma „Esperanto v arabských zemích“, kde hlavní přednášku bude mít sám ministr kultury Jordánska.

-esperanto-

Papež opět esperantsky

Slavnostní nedělní velikonoční mše 23. dubna, kterou sloužil papež Jan Pavel II. na Svatopetrském náměstí v Římě za účasti 100 000 věřících, trvala přes dvě hodiny. Po mši papež přednesl své tradiční poselství Urbi et orbi, v němž v 61 jazycích požehnal městu Římu i celému světu. V esperantu papež řekl: „Feliĉan Paskon en la nomo de Kristo resurektinta.“ (Šťastné Velikonoce ve jménu Krista z mrtvých vstalého.) -Radio Vaticana-

7. konference Českého esp. svazu

se bude konat ve dnech 13.-15. října t.r. ve Znojmě.

Ve Státním okresním archivu ve Znojmě, Divišovo nám. 5, byla otevřena výstava Esperantem k mezinárodnímu dorozumění. Výstava je přístupná vždy v pondělí a ve středu od 8 do 17 hod. a potrvá až do konce letošního roku. -EK Znojmo-

Ocenění esperantské sbírky

Na Celostátní výstavě poštovních známek Brno 2000, která se konala letos počátkem března u příležitosti 150. výročí narození T. G. Masaryka, vystavovalo více než 200 filatelistů z 20 zemí. Mezi nimi i Vladimír Váňa z Plzně, člen esperantské sekce Svazu českých filatelistů. Jeho sbírce „Kapitoly z dějin esperanta“ mezinárodní výstavní porota přisoudila velkou pozlacenou medaili.

Váňova sbírka patří mezi tři světově nejúspěšnější esperantské filatelistické exponáty, vedle sbírek R. Burmeistera a VI. Hasaly.

-vlha-

Důležité upozornění!

**V červenci a srpnu se schůze klubu nekonají.
O začátku v září budete včas informováni.**

Pražskými ulicemi...

V Modřanech poblíž Sofijského náměstí má řada ulic názvy vztahující se k Bulharsku: Plovdivská, Rodopská, Rilská, Pirinská, Botevova, Vapcarova, Levského atp. Jedna z nich má název „Pejevové“. O koho jde?

Vela Peeva - tak se její jméno píše v esperantu - byla esperantistka, mladá partyzánka, bojující v době druhé světové války proti fašistickému režimu v Bulharsku. Přežila zničení svého partyzánského oddílu a úplně sama se celé týdny skrývala v rodopských lesích. Nakonec byla prozrazena a obklíčena oddílem fašistických vojáků. V nerovném boji si poslední kulku ponechala pro sebe. Na hoře Černovec v Rodopech, na místě kde zahynula, byl postaven pomník s bulharským a esperantským nápisem. Po válce byla její rodná obec Čepino spojena se sousedními obcemi a takto vzniklé nové město bylo pojmenováno Velingrad, t.j. Velino město.

Jsme hrdi, že máme v Praze ulici pojmenovanou po této statečné bulharské esperantistce.

-jpa-

Angličtina už i v japonštině

Kancelář japonského předsedy vlády zaslala svým úředníkům oběžník, kterým je vyzývá, aby se vyhýbali používání nových slov na základě angličtiny.

Podle japonských novin toto rozhodnutí odstranit „byrokratický žargon“ ze smíšených slov napůl japonských a napůl anglických vychází z faktu, že tato nová slova jsou nesnadno srozumitelná pro veřejnost. Vládní úředníci vytvořili příliš mnoho takovýchto nových slov na základě angličtiny z toho důvodu, že „japonštinou jinak nelze popsat nové pojmy“. - Radio Vaticana -

Esperanto v rozhlase...

Ĉina Radio internacia, Peking

vysílá v esperantu pro Evropu denně od 22 00 do 2 2 30 hod. našeho letního času na krátkých vlnách 30 m (9965 kHz) a 25 m (11730 a 11810 kHz).

Adresa: Ĉina Radio Internacia Esperanto-Redakcio Beijing 100040, Čína nebo: cri@box.cri.com.cn

Rádio Aŭstria Internacia, Vídeň

vysílá v esperantu každou neděli od 1 0 05 do 1 0 30 hod. letního času na krátkých vlnách 49 m (6155 kHz) a 22 m (13730 kHz) a na satelitu Astra ADR (11.141 H, /Bayern 3/ 8, 10) a Astra ORF-DVB-Bouquet (12.692 H, SR 22.000: FEC 5/6). Tento pořad je opakován ve 14 °5 hod. a také po půlnoci - tedy v pondělí ráno - v 01 30 hod. a v 06 05 hod. letního času na stejných vlnách.

Tyto pořady lze zachytit na Internetu na stránce ROI, na LiveAudio a po celý týden na RealAudio. <http://roi.orf.at/roi/esperanto>

Adresa stanice: Radio Aŭstria Internacia, Esperanto-Redakcio

AT-1136 Wien, Rakousko nebo: roi.esperanto @ orf.at

V roce 1999 Radio Aŭstria Internacia obdrželo celkem 34 tis. dopisů od svých posluchačů, z toho nejvíce německá redakce (12,4 tis.), druhá byla esperantská redakce (10 tis.), dále anglická (6,5 tis.), španělská (3 tis.), francouzská (1,6 tis.) a arabská redakce (1,3 tis. dopisů). Z toho esperantská redakce dostala 2911 „papírových“ dopisů (vč. pohlednic a koresp. lístků) a 7117 „elektronických“ dopisů (e-mailů).

Jiří Karen

Naskiĝis 11.6. 1920 en Litomyšl,
mortis 30. 4. 2000 en Praha.

Forpasis ĉeĥa poeto, aŭtoro de dudeko da poemaroj, el kiuj multaj estis premiitaj. Li estis esperantisto, membro de nia klubo, en kiu li havis vicon da prelegoj pri la literaturo kaj la poezio aparte.

En Esperanto aperis liaj poemaroj Flugilhava ŝtono (en traduko de Jiří Kořínek) kaj Antaŭ la naŭa ondo (traduko de Rikardo Ŝulco). Liaj originalaj Esperantaj poemoj aperadis en diversaj gazetoj. En la es. eldonoj de Paco aperis liaj Esperantaj tradukoj de noveloj de ĉeĥaj aŭtoroj, li tradukis la fragmentojn el František Kožík por la broŝuro: Poeto ne mortas. Lia traduko (kun J. Vondroušek) de La plej granda el pierotoj de Fr. Kožík restas dume en manuskripto. Aktive li partoprenis la Tradukistan seminarion honore al la 100a naskiĝdatreveno de Rudolf Hromada en Brno en la j. 1990, en kies prelegkolekto aperis ankaŭ liaj kontribuoj, precipe la studo „Tradukado kiel metio kaj arto“.

Honoron al lia memoro!

El mia poetiko

Sub premo de la realo
naskiĝas poemo.
Sanggutante vi devas
viajn poemojn skribi.

Oni ne ŝatas pri belo revii,
se belo verdire
nur sencelas.
Tiel efemeris
la verko.

Odeŝel český básník, autor dvacítky básnických sbírek, z nichž mnohé obdržely zvláštní ocenění. Byl esperantistou, členem našeho klubu, v kterém měl řadu přednášek o literatuře a o poesii zvláště.

V esperantu vyšly jeho sbírky Okřídlený kámen (v překladu Jiřího Kořínka) a Před devátou vlnou (překlad Richarda Schulze). Jeho originální esperantské básně vycházely v různých časopisech. V čs. vydáních časopisu Paco (Mír) vycházely jeho esperantské překlady novel českých autorů, přeložil úryvky z Františka Kožíka pro brožuru: Básník neumírá. Jeho překlad (spolu s J. Vondrouškem) Největšího z pierotů Fr. Kožíka zůstal zatím v rukopisu. Aktivně se zúčastnil Překladačského semináře na počest 100. výročí narození Rudolfa Hromady v Brně v roce 1990, v jehož sborníku přednášek vyšly i jeho příspěvky, zejména studie „Překládání jako řemeslo a umění“.

Čest jeho památce.

Manoj

Vano angora foras
de virina mano.
Kompate nin kuracas
en klimato paca

patrinaj manoj,
ĉiam pretaj
nin amplene
ĉirkaŭpreni.

Etenditajn memoras mi
manojn de patrino mia,
la manojn, kiujn iam
mi forgesis kisi.

Ivan Blatný (1919 - 1990)

Připomínáme si desáté výročí úmrtí českého básníka Ivana Blatného, který většinu svého života prožil v exilu ve Velké Británii. Z jeho tvorby uvádíme studentskou esperantskou básničku *Somera vespero* (Letní večer) a pozdější českou báseň *Zpěv*, kterou do esperanta přeložil Josef Rumler.

Ni rememorigas al ni la dekan datrevenon de la morto de ĉeĥa poeto Ivan Blatný, kiu plejparton de sia vivo pasigis en ekzilo en Britio. El lia verkaro ni prezentas lian studentan esperantan poemeton *Somera vespero* kaj la pli postan ĉeĥan poemon *Kantado*, kiun esperantigis Josef Rumler.

Zpěv

Docela blízko u mne, zde v tomto pokoji
strýček Josef se učí esperanto a brnká
na kytaru,
jen malý kousek odtud, docela blízko
u mne, ve čtvrtém rozměru,
docela blízko u mne a jednou nohou
a jednou nohou skoro ve třetím,
docela blízko u mne šeptá: Mi estas
esperantisto! Parolu esperante, Ivano! Ivano!
Jste všichni v tomto bytě.
Docela blízko u mne mrtvý roznašeč
z půjčovny obrázkových časopisů
otvírá právě dveře.
Docela blízko u mne babička bere
obrázkový časopis.
Bylo to první den. Právě se předplatil.
Docela blízko u mne.
Jste všichni v tomto bytě.
Mrtvý hudební skladatel, kterého
milovala, se usmívá z černého rámečku.
Docela blízko u mne smrt neustále
přítomná kosí hudební skladatele.
Docela blízko u mne esperantisté
odcházejí v davech do záhrobí...

Somera vespero

Subiris la suno,
ekbrilis la luno.
Trankvila vespero -
ekdormas la tero.

Velkanta de floro
elfluas odoro,
rememor' pasinta
je printemp' estinta.
Je printemp' belega
sen varmo grandega,
je freŝa printempo
pasinta, aĥ, tempo.
(1933)

Kantado

Tute proksime ĉe mi, ĉi tie en ĉi ĉambro
la onklo Jozefo lernas Esperanton
kaj tintas sur gitaro,
nur etan peceton de ĉi tie, tute
proksime ĉe mi, en la kvara dimensio,
tute proksime ĉe mi kaj per unu piedo
kaj per unu piedo preskaŭ en la tria,
tute proksime ĉe mi li flustras:
Mi estas esperantisto! Parolu esperante,
Ivano! Ivano!
Vi ĉiuj estas en ĉi loĝejo.
Tute proksime ĉe mi la morta
kolportisto el la pruntejo de
bildgazetoj apertas nun
la pordon.
Tute proksime ĉe mi la avino abonas
la bildgazeton.
Okazis la unuan tagon. Ĵus estis ĝi
antaŭpagita. Tute proksime ĉe mi.
Vi ĉiuj estas en ĉi loĝejo.
La morta muzika komponisto, kiun ŝi
amis, ridetas el nigra kadreto.
Tute proksime ĉe mi la morto
senĉese prezenca falĉas la komponistojn.
Tute proksime ĉe mi la esperantistoj
foriras amase en la regionon transtomban...

Jste všichni v tomto bytě.
Strýček Josef se brání: Mi estas
esperantisto!
Docela blízko u mne smrt ukazuje tiše
na dveře.
A strýček Josef odchází váhavě do
jídelny, docela blízko u mne.
Docela blízko u mne sestupuje po
schodech.
Jste všichni v tomto bytě.
Prosím vás, dejte už jednou spravit tu
starou singrovku!
Zašeptá někdo kdesi docela blízko
u mne.
Docela blízko u mne.
Jste všichni v tomto bytě.
Byla to sice kruhovka, ale staršího
typu.
Jsme všichni v tomto bytě.
Jen strýček Josef právě vyšel do dvora.
(1947)

Vi ĉiuj estas en ĉi loĝejo.
La onklo Jozefo sin defendas: Mi estas
esperantisto!
Tute proksime ĉe mi la morto montras
silente al la pordo.
Kaj la onklo Jozefo foriras heziteme
en manĝejon, tute proksime ĉe mi.
Tute proksime ĉe mi li descendas la
ŝtuparon.
Vi ĉiuj estas en ĉi loĝejo.
Mi petas vin, igu foje ripari tiun
antikvan singraĵon!
Ekflustros iu ie tute proksime ĉe mi.
Tute proksime ĉe mi.
Vi ĉiuj estas en ĉi loĝejo.
Estis ĝi nome rondforma kudromaŝino,
sed de pli aĝa tipo.
Ni ĉiuj estas en ĉi loĝejo.
Nur la onklo Jozefo ĵus eliris en la
korton.

Tradukis Josef Rumler (1989)

BULTENO nepravideľný věstník

Placeno v hotovosti Novinová zásilka

Vydává Klub esperantistů v Praze
pošt. schr. 1069, 111 21 Praha 1
Podávání novinových zásilek povolila
Česká pošta, s. p., Odštěpný závod Praha
čj. nov 6127/96 ze dne 23. 10. 1996